

Johann Wolfgang von Goethe,

Elfregho

tradukita de Richard Schulz

Malfrua ĉeval' en nokta vent' ?
La patro estas en korturment'.
Enbrake tenas infanon li,
sekure, tamen kun zorg' pri ghi.

Fileto, kial vi timas nur? -
Eksonas, paĉjo, elfa murmur'.
Jen glitas reĝo kun elfoj mil. -
Nebul' ĝi estas, mia fil'. -

“Ho, ĉarma knabo, sekvu min!
Juvelojn havas mia patrin'.
Kolorajn florojn ricevos vi,
Kaj vi ludos gaje kun papili'.”

Ho patro, ho paĉjo, la elfreĝo jen!
Li logas min for al luksa festen'! -
Ne timu! Dormu, mia etul'!
Susuras arboj en la nebul'. -

“Nu venu, fajna knabo, kun mi!
La princinoj zorgos kun ĉarm' pri vi.
La princinoj dancos dumnokte en rond'
Kaj kante vin lulos en bela rotond'.”

...

Ho patro, ho paĉjo, filinoj de l' reĝ'
 Insidas tie malantaŭ la heĝ'. -
 Mi bone vidas, mia filet',
 De grizaj salikoj jen estas aret'. -

“Mi nepre vin bezonas por mia eskort’.
 Se vi ne konsentas, estiĝu perfort’!” -
 Ho patro, ho paĉjo, ve, kia krUEL!
 Elfreĝo venis al sia cel’! -

La patro rajdas kun granda rapid’.
 Li timas. En brak’ lia ĝemas la id’.
 Li pene venas al la kort’.
 La knabon prenis jam for la mort’.

*Traduko de la Germana poemo “Erlkönig” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26).*

Arg-588-1186 (2014-03-14 13:06:19)

Tiu chi traduko aperis en 1981-07-01 en la Vestfaliaj Flugfolioj, kiujn eldonis Richard Schulz (Rikardo Shulco) mem. Pri Richard Schulz vidu la wikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.